

BONA ESPERO

*ORGANO DE LA SUD-AFRIKA ESPERANTO-ASOCIO
KAJ REVUO DE LA ESPERANTA KULTURO*

Volumo: 1986
Numero 1

ISSN 0006-7024



J.J. ZEELIE

ENHAVO

Grava Atentigo	1
Nebula Tago (<i>Arno Kucharzik</i>)	2
Judaj Festoj (<i>Oskaro Sher</i>)	4
Alvoko (<i>Albert Goodheir</i>)	5
Simbola Floro (<i>Axel von Blottnitz</i>)	6
Plia Esperanta Simbolo	
Amkanto (<i>L.N.M. Newell</i>)	7
Raporto de la Port Elizabeta Esperanto-Klubo	8
Aldona Sukceso	12
Sennacieca Asocio Tutmonda, Publika Letero (<i>Krešimir Barkovič</i>)	13
Omaĝe al Julia, la Virino Kiu ne Scipovis Morti (<i>Kris Long</i>)	14
Transskribado de Personaj Nomoj (<i>Bernard Golden</i>)	16
L'Inkujo	17
Sud-Afrika Esperanto-Asocio, Financa Raporto—1985 (<i>Colin S. Beckford</i>)	18
Asocio Sendiskriminacia	
Skaloj, Kvietaj Horoj (<i>Edwin de Kock</i>)	19
Libroj	20
Vintra Penso (<i>William Auld</i>)	
Kial ne Kongresi en Bulonjo-Apud-Maró?	
Bona Espero, Sud-Afrika Esperanto-Asocio (SEA)	21

GRAVA ATENTIGO

PER ĉi tio Bona Espero fariĝas pli ol nur landa revuo, akirante gravan dimension de ankaŭ internacia kulturo. Aperos en ĝi, ekde nun, bonaj kontribuoj el la plumo de eksterlandanoj, iuj tre eminentaj. De ili mi mencias nur du nomojn: William Auld kaj Albert Goodheir.

— Kio okazis, kaj ĝuste kia estos la nova *Bona Espero*?

Ĝis la fino de 1985 la redaktisto estis Cobus Zeelie, kiu devis rezigni pri ĉi tio por kompletigi sian doktoriĝon. Domaĝe, kvankam neeviteble; ĉar li faris tiom. Li nome tre pliampleksigis la revuon, multe aldonis al ĝia allogo materia kaj sukcesis tiri al ĝi kreskantan atenton, ankaŭ alilande. Lin ni devas kaj volas danki elkore por tiu kontribuego.

Sed post lia ekŝigo kompreneble leviĝis la tikla demando: Kiu pretos fariĝi la nova redaktisto? Dum longa tempo neniu volis, kaj multaj ne povas, reporti la falintan torĉon. Do fine mi trovis min iel devigita proponi min mem, kun tre multaj hezitaj, pro jam troaj taskoj kaj projektoj.

Unu el ĉi lastaj, kiun mi jam longe dorlotis, estas la starigo de nova revuo, por aperigi *nur originalaĵojn*, kun neniuj tradukoj. Dum mia vizito al Eŭropo pasintjare kaj precipe dum unumonata restado en Italujo, mi vane klopodis trovi redaktiston aŭ eldononton.

Kiam mi cedis al la neceso iel savi la vivon de *Bona Espero*, pro konsidero al la Sud-Afrika Esperanto-Asocio, mi klare esprimis mian esencan kondiĉon al la estraranoj: sub mia redaktado ĝi havos duoblan karakteron. Unue ĝi ja restos la organo de nia landa organizo. Due, tamen, ĝi fariĝos revuo en kiu aperos ankaŭ beletraĵoj, literatura kritiko, eroj Esperantologiaj, kaj fakte ĉio, kio povus iel kontribui al nia kulturo.

Laŭ mi ekzistas neniu kialo por malhelpi la pacan kunekzistadon de la du tendencoj, kvankam mi almenaŭ unufoje subaŭdis grumblon pri “ĉantaĝo, ĉar li ja scias, ke ni havas neniun elekton!” Nu, bone ke ni komprenas unu la aliajn.

Kion mi do akceptus por aperigo? Principe ĉion konforman al la supremenciitaĵoj. Oni do notu, ke mi rifuzos ĉiujn tradukojn—afero pri kiu oni rajtas alsendi kontraŭajn opiniojn por la revuo, kvankam mi rezervas la rajton oponi al ili miajn proprajn. Kaj krome mi kompreneble deziras ankaŭ kvaliton.

Ĉirilate mi devas klare esprimi mian reagon al la seksa temo. Mi ne apartenas al la tribo de pruduloj. Aliflanke, tamen, mi konas la diferencon inter literaturo kaj nura pornografio, kiun mi trovas terure enuiga.

Mi esperas, ke la simbiozo inter la organo de nia Asocio kaj la Esperanta kulturo montriĝos utila por la Internacia Lingvo.



NEBULA TAGO

Du steloj min ekĉasas
tra stepoj de la sonĝo,
per sago min venenas
kaj pacon de mi trenas,
ĝin manĝas, ronĝ' post ronĝo.

Du manoj mole fosas
el sabloj de l' sopiro
tuberon de feliĉo—
el la sekreta niĉo
de mia foradmira . . .

Morgaŭ mi devas streĉi
amarkon tardvespere;
ĉasisto, kiu sin ĉasas,
ridante sin frakasas
kaj mortas plenespere.

“La blankuloj min liberigis tiam, mastro, ĉar mi estis mortanta.
Laŭ ilia leĝo oni devas sola tristiĝi en karceroj
pro pasia senintenca murdo.”

“Vi estis bonŝanca.”

Liaj brunaj okuloj, ruĝigite de Kalaharisunoj, min rigardis.
“Eble, mastro, sed ŝi estis reedzinigita, kiam mi revenis,
kiel sendube la vidvino de la longpieda homo kiun mi ĉasis
antaŭnelonge. Sed la kolharaj homoj grumblis malsataj . . .”

Mi enspiris ankoraŭ brilfreŝajn horizontojn de l' mateno,
friska kiel camotranĉo, kiam la tribeto sin instigis
al laboro per ark' kaj sagoj, fosobaston'
kaj felsako, tra okre farbitaj stepoj, kie la viv'
batalas kontraŭ la sunbakitan naturon, ĝis la nokta
lundanco kaj kanto sur klaketanta pado fabela,
dum la aeron rido arĝentis. Ho feliĉa cel'
kiu kreskas kiel hejmeca suko inter dezertŝtonoj,
longpaŝe sovaĝas gazele kiel sur gazonoj.

Li konservis la mortigajn sagojn en flava plastotubo;

anstataŭ la reĝa karos' li portis kadukan
nilonĉemizon, kaj mi devis rememori, ke tiuj
primitivuloj solaj en mondo evoluigis plej altan
artformon el sovaĝa nenio, kiel diamant' inter ŝtonetoj;
kaj anstataŭ paŝtnudigi siajn magrajn stepojn akride
ili frostotremis dum vintro ĉirkaŭ minifajroj kaj prenis danke
nur la plej necesajn el delikata ekologisistemo,
jarcentojn antaŭ naturkomplezemaj sciencoj.

Li trinkas venenverdan limonadon el plastbotelo.

“Ne prefere strutovŝelo, kiel prauloj? ”

Li ridetis. “Ni nun vendas ilin al turistoj, mastro.
Eble ili multe pli soifas! ”

Se nur l'okulo povus vagi plu, sen limo,
al novkreitaj horizontoj en arkĉaso,
kun koro burĝonanta sable el aspiro,
ja certe signifiĝo de la sorto homa
reevoluus eĉ en ĉi muzevitriko.

Ekster panelovitro en boŝmana halo
pace balaas ido de dezerttherooj,
kvazaŭ pentrita en kaverno, tempkristalo;
ankoraŭ montras rokan vivcertecon dum
konflikto muelanta en betonĝangalo.

-- Arno Kucharzik

**Nova talento verkanta
en nia lando.**

KLARIGOJ

de vortoj kaj aludoj

boŝmano: Flaveca, malaltstatura praindiĝeno nenegra, parolanta lingvon hamidan,
loĝintan multloke in Suda Afriko antaŭ la alveno de kaj la nigraj kaj la blankaj
homoj. Nuntempe ili troviĝas ĉefe en Bocvano kaj Namibio. La vivmaniero de
tiu popolo neolitika estis kaj certgrade ankoraŭ restas nomade ĉasista kaj
senagrikultura. Lastatempe, tamen, ĝi komencas cedi al tiu de la ĉirkaŭaj
popoloj.

camo: Speco de sovaĝa akvomelono.

“fosas . . . tuberon, fosobastono”: Kvankam neagrikulturaj, la Boŝmanoj ja rikoltas la kreskaĵojn de la naturo, ĉiam restigante ion por la rekresko de la posta sezono.

Kalahario: Dezerta kaj duondezerta regiono en Suda Afriko.

“Kolharaj homoj”: Boŝmana nomo por la leonoj.

“Longpedaj homoj”: Boŝmana nomo por ĉasbesto.

“mi estis mortanta . . . en karceri”: Kontraste al blankaj aŭ nigraj malliberigitoj, la boŝmanaj facile mortas en prizono, kutime loĝantoj de spacoj nefermitaj.

“plej alta artformo”: Observu la mankon de *la*. La Boŝmanoj, ŝajne sen rilato kun alia tradicio, kreis verkojn imponajn, precipe siajn pentraĵojn, ĉefe en kaverno. Ili eĉ memstare malkovris la principojn de perspektivo!

“sago . . . venenas”: La Boŝmanoj kutime pafas siajn sagojn venenitaj, sed ĉi tie la poeto uzas la duan vorton metafore. Temas pri tio, ke enamiĝinto de tiu popolo fakte “ĉasas” la amatinon per speciala pafarko malgranda kaj sageto. Per ĝi li ŝin pafas en la sidvango. Se ŝi akceptas la sageton, la signifo estas, ke ŝi akceptas lin. Neolitika Kupidio!

JUDAJ FESTOJ

VESPERE la 1986.04.23 komenciĝis la plej konata el la Judaj Pilgrimfestoj. La Biblio parolas pri ili en Readmono 16,16. De la tuta Israelo oni vojaĝadis al la templo en Jerusalemo. La Pilgrimfestoj estis kaj agrikulturaj kaj religiaj, lige al la Eliro el Egiptujo.

La plej konata el tiuj festoj estas la Pasko. Pri ĝi la Biblio ordonas en Nombroj 28.16. Ĝi estas nomita la Festo de Libereco, ĉar antaŭ miloj da jaroj la Izraelidoj forlasis Egiptujon, kie ili estis sklavoj. Pri tio oni povas legi en la dua libro de la Biblio.

En la citaĵo el Nombroj troviĝas la vorto *maco*. Alia nomo por Pasko estas la Festo de la Macoj. Maco estas

pano en kiu oni ne uzis giston. Do ĝi estas plata. Ĉar la Izraelidoj rapidis forlasi Egiptujon, ili ne atendis por la pasto fermenti. Do post kiam ili intermiksas la farunon kaj la akvon, ili bakis platajn maldikajn biskvitojn.

La preparado por la Pasko estas preskaŭ tiel ekscita kiel la festo mem. Oni ĝisfunde purigas la domon, anstataŭigas la pladojn per specialaj, kaj la infanoj ricevas novajn vestojn.

La nokton antaŭ la Pasko la patro iras de ĉambro al ĉambro, kun kandelono enmane, serĉante panerojn. La infanoj helpas al li, kolektante ĉiujn fermentaĵojn. La patro metas ilin flanken por detrui antaŭ la festo, ĉar la Biblio ordonas al Judoj ne havi fermentaĵojn en siaj hejmoj dum la

tuta Pasko.

La geknaboj eĉ pli ĝuas la unuajn du vesperojn de la festo. Dum tiuj vesperoj preskaŭ ĉiu, kiu povas, ĉeestas Sederon. La Hebrea vorto *seder* signifas *sinsekvon*. Ĝi estas la nomo de la ĝoja familia vespermanĝo kaj Diservo, kiu okazas en Judaj hejmoj dum la Pasko.

Ĉiuj sidas ĉe bele sternita tablo. Ĉe la kapo estas plado kun la simboloj de Pasko. Tie estas tri macoj memore al la nefermentinta pano, kiun la Izraelidoj manĝis kiam ili liberiĝis el Egiptujo; amaraj aromherboj por memori pri la amaro de la sklaveco; osto por memori pri la ŝafido, kiun la Izraelidoj manĝis antaŭ ol ili forlasis Egiptujon kaj ĥaroseso—plado farita el pomoj, nuksoj, cinamo kaj vino intermiksita por aspekti kiel la argilo el kiu la Izraelidoj faris brikojn.

Oni legas el la Hagado. La Hagado estas libro de rakontoj, kantoj kaj poemoj, kiuj traktas pri la Eliro. Ĝi entenas ankaŭ danko- kaj laŭdpreĝojn al Dio. Ĉe la komenco de la Hagado la plej juna infano metas la “kvar demandojn” pri la signifo de la Diservo. La respondoj, kiujn oni legas el la Hagado, klarigas la Paskajn simbolojn kaj rakontas pri la mirinda eskapo de la Izraelidoj el Egiptujo kaj iliaj aventuroj ĉe la Ruĝa Maro kaj en la dezerto.

Gastoj ĉiam bonvenas ĉe la Sedero, ĉar ĉi tiu festo estas tempo por gastameco. Ĝi estas vespero kiam eĉ la plej malriĉa homo devas senti sin

libera de zorgoj.

Piaj Judoj observas la unuajn du tagojn de Pasko kiel sanktajn tagojn. Ili ne laboras, kaj specialaj Diservoj okazas en la sinagogo. La sekvantaj kvar tagoj estas duonsanktaj. Judoj rajtas labori sed ne manĝi fermentintan panon. La sekvantaj du tagoj estas sanktaj. Do entute Pasko daŭras ok tagojn.

— Oskaro Sher

ALVOKO

Nordvintra suno,
malalta eĉ tagmeze,
suombras padon
sub branĉoj senfoliaj
kaj miaj paŝoj
konscias pri ĉeesto
neniam fora,
malofte manifesta.
Mi vin alvokas,
restantan en la ombro,
vivodonantan,
fortigan kaj konsolan,
dum konkerantoj,
viaj sendankaj idoj,
per sango skribas
la mondan historion
kaj analizoj
vin neas aŭ forgesas.
Vi, lumo el la ombro,
senfunda oceano, prapatrino.

— Albert Goodheir

SIMBOLA FLORO

Ĉiu ŝtato kaj provinco de nia lando havas siajn simbolojn el la naturo. En la sekvaĵo estas uzataj la jenaj mallongiĝoj:

F: floro, **M:** mamulo, **B:** birdo, **A:** arbo.

SUD-AFRIKA RESPUBLIKO:—

F: *Protea cynaroides*, **A:** *Podocarpus*, kvar specioj, **M:** *Antidorcas marsupialis*, **B:** *Tetraptyx paradisea*.

KABA PROVINCO:— **F:** *Disa uniflora*, **A:** *Leucadendron argenteum*, **M:** *Dame-licus dorcas*, **B:** *Turacus corythaix*.

TRANSVALO:— **F:** *Zantedeschia pentlandii*, **A:** *Adansonia digitata*, **M:** *Aegyceros melampus*, **B:** *Telophorus zeylanus*.

NATALO:— **F:** *Strelitzia reginae*, **A:** *Albizia adionthifolia*, **M:** *Comochactes gnou*, **B:** *Gypaetus carbatus*.

ORANĜA LIBERŜTATO:—

F: *Crinum bulbispermum*, **A:** *Olea africana*, **M:** *Comochaetes gnou* (ree), **A:** *Afrotis afra*.

NAMIBIO:—

F: *Welwitschia mirabilis*, **A:** *Acacia erioloba*, **M:** *Oryx gazella*, **B:** *Lanarius atro-coccineus*.

CISKEJO:— **A:** *Sideroxylon inerme*.

Ĉu organizaĵoj kiel la Ruĝa Kruco, Rotarianoj, k.t.p., ankaŭ akceptis por si tiajn simbolojn? Ĉu nia propra movado?

Nesciante tion, mi trovis floron, kiu tre klare elmontras multajn kvinpintajn stelojn verdajn, kaj proponas, ke ĝi estu akceptita kiel nia flora simbolo.

Feliĉe ĝi estas harda, rezista kaj tolerema rilate al vento, grundotipo, frosto kaj sekeco. Ĝi do verŝajne povas esti sukcese kultivata en la ĝardeno de ĉiu esperantisto, kie ajn tiu

logas. Ĝia origina devenareo estis Mediteraneo. Jen ĝia botanika nomo:


PHLOMIS FRUCTICOSA

Ĝi apartenas al la familio *Lamiaceae* (antaŭe *Labiatae*) al kiu apartenas ankaŭ la spicherboj rosmareno, salvio, timiano, satureo, origano, ocimo/bazilio, metiso, majoramo, lavendo, hisopo, monardo kaj la mentoj—ankaŭ la florgenusoj *Coleus*, *Leonatis*, *Orthosiphon*, *Pleotranthus* kaj multaj aliaj.

Ĝi estas plurjara arbusto, ĉirkaŭ 1,20 m alta, kun belaj flavaj floroj.

Por niaj Sud-Afrikaj abonantoj mi havas sufiĉajn idojn pretaj por disdoni.

— Axel von Blottnitz



PLIA ESPERANTA SIMBOLO

Subtenante la supran ideon, mi jam kun danko akceptis mian *Flomon* de Axel. La planto bone kreskas en mia ĝardeno.

Kaj nun mi ankaŭ proponas, ke nia Esperanta Birdo estu la *hirundo*. Ĝi apartenas al la familio *Hirundinidae* kaj troviĝas en ambaŭ hemisferoj. Unu speco flugadas inter Eŭropo kaj Sud-Afriko, tirante profiton el ambaŭ someroj. Sed la hirundoj fakte iras al ĉiuj kontinentoj, interalie Ameriko.

Ni atendas la komentojn de la legantoj—ankaŭ proponojn por Esperantaj Mamulo kaj Arbo.

— La redaktisto

Unua Aperio

AMKANTO

Venu, kara; la krepuska tenebro
Tra la fenestro dampas la kolorojn,
Kaj la vivon; ploras mute la pluvo.
En la lampa sfero silento ŝimas,
Nur la tima susur' de koro flustras.
Fremdas ĉio. La tempo foroblikvas,
Kaj la realon fendas. En kristalo
Nano neiĝas, ombro, punkto, falas
Kie terur' apikas en abismon.
Kara, donu la manon, la rigardon—
Ke mi vidu la memon, la realon
Kiu estas vi, kiu ne fandiĝas.
Jen proksimas via vizaĝ': min gvidu
Via okulo en serenon mondon,
Kie mi trovos certon kaj komprenon.
Meze de la spegulo: punkto, ombro;
Ĝi grandiĝas homo, nana, giganta,
Kiu vojon en la animon baras.
Nigra figur' mimikas min por moki
Ĉian aliron: nur min mem mi vidas
Sur la fenestro: fone la obskuro,
La nekoneblo . . . Nur nin mem ni amas—
La figuron kiu baras eniron
Tra la spegulo; kaj la amo estas
Vana atendo apud pordo. Venu,
Kara: sen parolo mi vin enbraku;
Eble la silenta tenero donos
Pacon. En la deliro ampasia
De la korpo la solo nin retrovu.
Tero lulas nin; la krepusko dampas
Niajn korojn; ploras mute la pluvo.

Aŭgusto 1961

— L.N.M. Newell

ĈU NE AGADO MODELA?

RAPORTO DE LA PORT ELIZABETA ESPERANTO-KLUBO

Por la periodo Majo 1986 ĝis Feburaro 1986

LA MEMBROJ de la Port Elizabeta Esperanto-Klubo (PEK) regule kunvenis dum la pasinta jaro, almenaŭ unufoje en ĉiu monato. Por la PEK-anoj 1985 verŝajne estis la plej aglena, la plej elstara kaj la plej historifara periodo de ĝia ekzisto. Pri tio informas la laŭmonata raporto ĉi-sube.

Tiuj membroj jam preskaŭ febre planas por la unua landa kongreso de la Sud-Afrika Esperanto-Asocio en 1987. Samjare kiam la Internacia Lingvo festas sian centjariĝon, nia landa organizo estos kvaronjarcenta. Espereble PEK gastigos la SEA-anojn kaj ties unuan landokongreson!

Tiele aspektis ĉe ni la pasintaj monatoj:

1985

MAJO

1. Ĉe la hejmo de prof. Buys la PEK-anoj spektis *Londono en Sono*. Tiu profesoro loĝas apud la Sekretariino, Adèle Fouché, kaj montras intereson pri la Internacia Lingvo.
2. Blinda esperantisto, Norman Felgate, de Natalo partoprenis pilkludan ĉampionecon en nia urbo. Li kontaktis la klubon.
3. La ĉefinĝeniero de Japana ŝipego *Osaka Maru*, Takoŝi Kawai, telefonis kaj aranĝis renkontiĝon kun la membroj de PEK. Li kaj la kuracisto de la ŝipo, Munetoŝi Nagasaki, poste kunvenis kun ĉiuj PEK-anoj. Li invitis nin kunveni sur *Osaka Maru*, kiam li refoje estos en la Port Elizabeta haveno, reirante hejmen.

JUNIO

Aperis artikolo en ĵurnalo pri la filo de gesinjoroj Jones de PEK. Li lernis Esperanton per si mem kvankam nur dekjara. Granda foto de Thomas kaj Adèle akompanis la artikolon.

JULIO

La klubanoj unufoje kunvenis surŝipe kiel gastoj de s-ro Kawai. Ni ĝuis Japanajn manĝaĵetojn kaj bieron (Saporo). Adèle Fouché invitis ĵurnalistinon

kaj fotiston. La artikolo kaj foto, kiujn ili publikigis, baldaŭ fariĝis historie gravaj por PEK; ĉar tio rezultigis la aprobon fare de la loka Teknikono (Politekniko) de la unua oficiala Esperanta kurso en Sud-Afriko. La Sekretariino donacis belan libron pri nia lando al s-ro Kawai. Ankaŭ por sia edzino li ricevis donacon.

AŬGUSTO

1. Pro la menciita artikolo enketis la rektoro de la Teknikono. La Prezidanto de nia Klubo, Cobus Zeelie, estas docento tie kaj diskutis la aferon kun li. La tagon poste, la ĉefo de la Lernejo por Sekretariaj Studaĵoj kaj Komunikado (konsistiga parto de la Teknikono), advokato Neville Wood, informis, ke li ĝoje enkondukos Esperanton kiel studobjekton. Kelkajn tagojn poste kunvenis la Teknikona Konsilantaro, kiu oficiale aprobis la kurson.
2. Pri tiu nova oficiala kurso aperis naŭ artikoloj en ses ĵurnaloj.
3. Plie konatigis la kurson ĉe la Teknikono tri anoncoj en tri ĵurnaloj.
4. Petite de d-ro Pretorius ĉe la altlernejo, Cobus Zeelie prelegis antaŭ la lekciistoj kaj aliaj de la Teknikono pri Esperanto, en la aŭdovida halo. Adèle Fouché laŭtleĝis al la ĉeestantaro el Genezo en la Biblio. Ni krome ekspoziciis diversajn librojn, k.t.p., en la halo. La tuta aranĝo estis granda sukceso.

SEPTEMBRO

1. Oni registris la teknikonan kurson ĉe la Departemento de Daŭriga Edukado kaj la Departemento de Dungado.
2. Entute 12 leteroj aperis en la *Herald*, regiona ĵurnalo, pri tiu oficialigo de Esperanto ĉe la Teknikono. El tiuj 2 estis kontraŭaj, 2 neŭtralaj kaj 8 favoraj. Iu persono el Durbano skribis persone kaj rekte al Cobus Zeelie, por kondamni lin ĉar li penas nuligi per internacia lingvo la Diajn punojn estiĝintajn pro la pekoj de la homo, ĉe la Turo de Babelo!
3. Adèle Fouché prelegis al anoj de preĝejo en Milnerton, Kaburbo. Tie ŝi ankaŭ renkontis kaj telefonis la lokajn klubanojn.
4. La nova oficiala kurso komenciĝis la 4an de Septembro 1985. La lekciisto estis Cobus Zeelie.
5. Aperis du artikoloj kun fotoj en du ĵurnaloj pri la kurso kaj la kursanoj.
6. Tutlanda radio-elsendo. Audrey Ryan intervjuis Cobus Zeelie pri la kurso, kaj Esperanto en aliaj landoj. Tio okazis en la programo *Aŭdiomix*.
7. La Bulteno de la Universitato de Port Elizabeto (UPE) anoncis venontajn

prelegon kaj debaton pri la utileco de Esperanto. La fono estis jene. Pro la favora reago de la publiko al la Teknikona kurso, ĉagreniĝis prof. Kruger, kiu estras la Bantulingvan fakon ĉe la Universitato. Agrese elserĉinte Cobus Zeelie, li unue petis lin ĉesigi la Esperantan kurson, kaj tiam defipostulis publikan diskuton kaj debaton kun li. Estis klare, ke li utiligos certajn argumentojn teknike lingvistikajn. Pro tio oni aranĝis, ke Edwin de Kock, la Prezidanto de la Sud-Afrika Esperanto-Asocio flugu al Port Elizabeto por tiu celo.

OKTOBRO

1. Aldona kurso komenciĝis ĉe Adèle Fouché. Temas pri personoj, kiuj volis sed ne povis registri por la Teknikona, tro plena.
2. Edwin de Kock prelegis, parte en la Angla, parte en la Afrikansa, antaŭ kaj esperantistoj kaj instrustabanoj de la Universitato, ĉe UPE. Poste prof. Kruger faris diversajn aludojn al Socilingvistiko kaj la Transforma Genera Gramatiko, sed precipe provis bagateliĝi Esperanton kiel piĝinon sensancan. De Kock tamen adekvate respondis al tio laŭ ĉiu punkto, precipe per detala komparo inter la tipaj karakterizoj de piĝinaj malriĉo kaj trosimpleco kun la Internacia Lingvo. Li emfazis tiukadre la gramatikan *rafinitecon* de Esperanto kaj emfazis ĝiajn valorojn altkulturajn, precipe la originalan literaturon—aferojn apenaŭ troveblajn en piĝino.
La profesoro koncedis: "Mi vidas, ke vi tre bone konas vian fakon". Kvankam li tiam asertis, ke li ne kontraŭstaras Esperanton, iuj PEK-anoj havas pri tio malan opinion. Ĉiukaze, li rifuzis paroli al ĵurnalisto, male al Edwin de Kock, pri kiu aperis—en la Afrikansa *Oosterlig*—longa kaj ege favora artikolo rilate al tio, ke li estas eksstudento kaj magistro de ĝuste tiu Universitato, poligloto, Akademiano kaj Esperanta poeto originala kun internacia konateco. Bonega reklamo por la Internacia Lingvo!
PEK dankas Edwin, kaj ankaŭ la Vic-Prezidanton de la Sud-Afrika Esperanto-Asocio, Axel von Blottnitz, kiu venis multajn centojn da kilometroj por ĉeesti, kaj aranĝis ekspozicion ĉe la Universitato.
3. La Prezidanto de SEA vizitis ankaŭ la Teknikonon, por renkonti advokaton Wood, Ĉefon de la Lernejo en kies kadro Cobus instruas Esperanton. Li ankaŭ vidis la lekciĉambron, kie la studentoj lernas la Internacian Lingvon, kaj ĝi bone impresis lin.
4. Alia aspekto de la vizito far Edwin de Kock estis, ke li ne venis al Port Elizabeto kiel privatulo. Li aranĝigis pere de Cobus Zeelie, ke la ĉi-tiea Teknikono invitu lin *oficiale*. Lia forirpermeso de sia propra Teknikono, kie li estas Departementestro pri Lingvoj kaj Komunikado, do estis tia.

Reirinte tien, li devis prepari kaj al sia propra rektoro sendi raporton *oficialan*, kiun devis tralegi plurajn funkciulojn.

5. La lokaj Teknikonstudentoj en la lingva fakto de la Lernejo por Sekretariaj Studaĵoj kaj Komunikado skribis legokomprenan Teston bazitan sur artikolcerpajo—kies verkinto estis Cobus Zeelie antaŭ kelkaj jaroj. Kompreneble temis pri Esperanto, kaj tio aperis en la ĉiujara *Technikon Magazine*. La testo estis el 40 poentoj.

NOVEMBRO

1. Aperis la jam aludita artikolo pri Edwin de Kock kaj la debato ĉe UPE.
2. Kvin Esperanto-revuoj artikolis pri Sud-Afriko kaj ĝia oficiala kurso. Temis pri *Heroldo de Esperanto* (Hispanujo), *Alumeto* (Kanado), *Esperanto* (UEA), *Sennaciulo* (SAT) kaj *Medicina Internacia Revuo* (Japanujo).

DECEMBRO

Okazis la jarfina socia kunveno ĉe Cobus Zeelie, kie ni kune parolis, kantis, manĝis kaj trinkis. La klubanoj akceptis la proponon, ke la landa kongreso de 1987 okazu en Port Elizabeto.

1986

JANUARO

La Teknikono prezentis kurson, kiu instruas kiel plibonigi la lekciajn kapablojn. Oni lernis kiel stari, paroli, uzi aŭdovidajn aparatojn, k.t.p. Poste ĉiu ĉeestanto devis fari duonhoran prelegon antaŭ la aliaj kursanoj. Cobus Zeelie, kiu partoprenis tion, lekciis pri la utileco de Esperanto kaj la gramatiko de la lingvo. La persono, kiu devis filmi la prelegojn sur vidobendon, poste diris, ke tio lin tiel interesis, ke li preskaŭ fuŝis la filmon! Ni sendube penos gajni lin por PEK . . .

FEBRUARO

1. La Sekretariino de PEK vizitis la *Seaview Guest Farm*, por konstati, ĉu ĝi taŭgos por la landa kongreso en 1987. Adèle informis favore, kaj la membroj decidis kunveni tie postnelonge.

Omaĝe al Julia,

LA VIRINO KIU NE SCIPOVIS MORTI

1

L'okuloj brulas. Verde palan krepuskon sekvas lampo. Lit' pikanta. Dorsdolor'. Sekala pan'. Seka. Flava te-imit'. Mi devas pisi en metalan sitelon en angulo, nur dufoje, laŭ gardist-inviti', eliri el karcer'. Tortur'.

2

Blondhara knabo kun okuloj melankoliaj: Dipatrin' bizanca. Vota procesio—gardist' aliĝas ĉiuporde, la pord-numeroj kaŝas ordon—sur greka vazo: l'urn-sitelon mi portas en medit-silent' al purigota necesejo.

3

Subite tus' obtuza vekas. Admona flustr' ekstere. Regas silento plej atente vigla. Mi volas sinki en la maton por kaŝi tion: ĉu virino rekonus tuson de l' amato?—absurde, histerie: pulsas la lipoj, ŝvelas gorĝa bul' . . .

4

La fingroj tremas. Sed serena mieno—sen okuloj—plene komprenas min. Parol' envolvas el klara kirlo: "Pacon. Pacon mi lasas al vi, mian pacon mi donas al vi". Paco solvas, inundas min per lum' interne: l'okuloj, l'ostoj pacon sternas.

5

Matraco silka. Mi volupte tordiĝas sub lanugkusen'. Subhorizonta suno skulptas kolomb-flugilojn: jen kolĉen' sukkena sur ĉielsateri' . . . Perono de kaban' antikva, pirarbo kaj vinberĝarden'; sunlumo la palpebrojn tiklas.

6

Mi staras kun ŝafpeltmantel' surŝultre. Blanka pano. Freŝa. Fromaĝ'. Jogurton el botel' komplik-ridete li transversas en ladan tason. L'iam ŝtalaj okuloj tondronub-veluras hodiaŭ . . . Blua pak-paper', du krudaj splitoj da suker'.

7

Konsternas min rubene ruĝa tapiŝo: ĉu la kabineto de l' patr'? Incenso, silkaj ŝtrumpoj, bapta frat' . . . "Mi estas preta, mi volas helpi vin: memoru do, helpu, kune ni laboru . . . Konfirmu, kion ili diris . . ." —"Purpuraj persaj sunsubiroj?"

8

Tra mil-kaj-unu-nokta pordo ĉampane frostas la veter': ĉielo greka, neĝo norda, lazuraj ombroj sur la ter'. Belega ŝaŭmo! Sed senhoma bazar'. Azi'. Oaza val'. Mi venas hejmen kun terpomoj violaj, floroj de migdal'.

9

Torturo ligas torturaton al torturantoj—per kompatato. Se mi eltenus—plej afable, bonkore—ili krimus malpli. Magia vergo do pravigas teruron, kreas ion belan. Dolora nod' al ili ligas min pli ol al najbar' libera.

10

Ŝtiparoj. Reloj. Agonie aer-ebria, mi ripozas sur—sunbrulinta haŭto: rozas la ĵus hakita pin'. Mi ardis en ŝafpeltmantelo silente, sole. Neĝ'. Arbaro. "Sed via ŝalo sunsubire persikas . . ." Sorpon ŝarĝas beroj.

11

"Asketo luktas kontraŭ Falso, vekonte lin. Sed Krist' aperas por ŝirmi venkoton: "Lasu lin—tiel oni ne konkeras malbonon. Restas guto. Lasta. Nur elĉerpinte, vi frakasos malbon-kalikon sen makuli la naskoteron aŭ kunulojn."

12

River' arĝente flagras. Ŝvelas surmonte kvin kupoloj bluaj sur rozaj muroj. Bluokule rigardas min flugil-juveloj, sespinta rozkolora ringo. Batite de rabist' en ligna kabano—pro silento—Sankta Seraf' akceptis kulpon danke.

Laŭ ŝia libro versigis

Kris Long

TRANSSKRIBADO DE PERSONAJ NOMOJ

LEGINTE kelkajn pasintjarajn numerojn de *Bulgara Esperantisto*, mi faris observojn pri la lingvouzo en tiu revuo. Ĝenerale la nivelo estas alta. Krom kelkaj komposteraroj, mi malofte trovis vortojn kaj esprimojn tute ne kompreneblajn. Ŝajnas, ke la redaktoro kaj korektisto sukcesis elsarki ĉiujn verajn bulgarismojn. Tamen, estas unu tre pridiskutenda aspekto de la lingvouzo: nekonsistenca estas la transskribo de nomoj de personoj, kiuj venas de lingvoj uzantaj la latinan alfabeton. Jen la diversaj manieroj, en kiuj *Bulgara Esperantisto* traktas tiujn nomojn:

1. La vok- kaj familinomo estas foneteke transskribitaj per la Esperanta alfabeto sen asimilado.
 - a. Rene Ŝulc (germane *Renée Schulz* aŭ *Schultz*)
 - b. Leĥ Koŝenjak (pole *Lech Kosieniak*)
 - c. Antoan Sen Ekzjuperi (france *Antoine de Saint-Exupéry*)
2. La familia nomo de famaj homoj estas esperantigita sed ne asimilita, kvankam ekzistas Esperanta formo.
 - a. Platon (*Platono*—PIV)
 - b. Dekart (*Kartezio*—PIV; france *Descartes*)
 - c. Lajbnic (*Lejbnico*—PIV; germane *Leibniz*)
3. La voknomo estas esperantigita kaj la familia nomo nur transskribita.
 - a. Alberto Ajnŝtajn (germane *Albert Einstein*). (Rimarku, ke en *Plena Ilustrita Vortaro*—PIV—tiu ĉi nomo estas registrita kiel “Ejnstejn” kaj la kemia elemento estas “ejnstejnio”.)
4. La etnolingva formo de la nomo estas uzata sen indiko de prononco.
 - a. Rezsö Szanto-Baler (Rezsö” devas esti “Rezsö” kun longa “o”)
 - b. Ludwig Renn
5. Apud la etnolingva nomo troviĝas interkrampe proksimuma fonetika ekvivalento laŭ la transskriba ebleco de la Esperanta alfabeto.
 - a. *John Wells* (Ĝon Uels). (pli ĝusta transskribo estas *Gan Ŭelz*; la formo *Ĝon* estas transskribo de la virina nomo *Joan!*)
 - b. *Joliot Curie* (Jolio Kjuri)

Devas esti evidente, ke la unuaj tri transskrib-manieroj ne estas bonaj, ĉar oni ne povas scii la originalan etnolingvan formon de la nomoj por serĉi ilin en

konsultlibro, por adresi leterojn aŭ por traduki el Esperanto alilingven. Rekomendinda estas nur la kvina maniero, ĉar oni scias la ortografion de la nomo kaj ankaŭ povas proponi ĝin pli-malpli ĝuste. Eĉ tiu ĉi maniero skribi fremdajn nomojn ne estas perfekta, ĉar povas manki diakritaj signoj, kiujn diversaj lingvoj aldonas al la latina alfabeto, sed la Esperanta alfabeto ne kapablas prezenti ĉiujn sonojn de ĉiuj lingvoj. Nepre bezonata estas kompromiso, kiu provizas uzantojn de Esperanto per maksimumaj informoj pri ortografio kaj prononco ene de la transskribaj limoj de Esperanto.

Reviziita: novembro 1985

— Bernard Golden

Redakta sugesto: La supra temo kaj ideoj estas diskutindaj. Ni invitas la legantojn ensendi siajn reagojn.




S-ro Ts. Bortzaya, Post restante, G.P.O. Ulan-Bator 13, P. R. Mongolujo, Tel. 5 15 05, Mongola Mez-Aziano. Krom ke li deziras korespondi pri Sud-Afriko kaj lingvoj, li invitas al si esperantistojn irontajn al la 71-a Universala Kongreso en Pekino per la trans-Siberia trajno.

S-ro Karol Chlebana, Sonnenbergstr. 6c, 7000 Stuttgart 1, F.R. Germanujo, 31-jara, kun multaj interesoĵ. interalie geografio, fremdaj landoj, metiamatoreco, naturaferoj, muziko, literaturo kaj kuirarto. Li precipe havas intereson pri nia lando diverskiale.

F-ino Lizeth Gitàn, 14 de Septiembro, A-30 Managua, Nikaragvo, 15-jara kaj sekretariino de la Filatelista Esperanto-Klubo, kiu havas specialan sekcion ankaŭ por eksterlandanoj.

S-ro Ŝławomir Majkowski, ul. Ogrodowa 27 woj. olsztyńskie, PL-11-706 Rybno, 18-jara liceano. Liaj interesoĵ estas lingvoj, muziko kaj geografio. Li ankaŭ tre volonte interŝanĝos poŝtmarkojn kaj bildkartojn.




S-ro Martin Zürn, Im Kessel 8, 2153 New Wulmstorf (apud Hamburgo), F.R. Germanujo, 27-jarulo laboranta ĉe la tiea universitato. Li ŝatus korespondi kun iu el nia lando. “Mi certe respondos al ĉiuj leteroj.”

LEA

SUD-AFRIKA ESPERANTO-ASOCIO

FINANCA RAPORTO—1985

ENSPEZOJ		1984
Kotizoj	189	174
Korespondkurso—enspezoj	139	180
—elspezoj	94	98
	45	82
Profito—vendo de skribmaŝino	148	—
Rento ricevita	439	323
Donacoj	48	30
	<u>R869</u>	<u>R609</u>
ELSPEZOJ		
Afranko	9	18
<i>Bona Espero</i>	264	223
Deprezo de skribmaŝino	—	50
Donaco al UEA, Nov-Jorko	54	35
Esperanto-lernolibro en la Afrikansa	23	—
Filiiga pago al UEA	26	19
Paperaĵoj	2	3
Reklamo kaj informado	49	40
Premio por konkurso	—	20
Veturkosto—Prezidanto	250	—
	<u>R677</u>	<u>R408</u>
<i>Gajno</i>	<u>R192</u>	<u>R201</u>



ASOCIO SENDISKRIMINACIA

El la Statuto de la Sud-Afrika Esperanto-Asocio:

“Rajtas al membreco ĉiuj personoj kiuj, sen diskriminacio surbaze de raso, ŝtataneco, religio aŭ sekso, simpatias la celojn de SEA kaj pagas sian kotizon.”

BILANCO JE LA 31a DE DECEMBRO 1985

PASIVAJ

Profito de antaŭaj jaroj	2437	2211
Preno el dumvivaj kotizoj	80	25
Gajno dum kuranta jaro	192	201
	<u>2709</u>	<u>2437</u>
Kapitalo	2709	2437
Dumvivaj kotizoj	884	904
Kreditoroj	80	—
Antaŭricevitaj enspezoj por 1986	127	113
	<u>R3800</u>	<u>R3454</u>

AKTIVAJ

Escom-obligacioj	1500	1500
Nedfin-Banko—depono kaj ŝparkonto	1799	1420
Rento ŝuldata	34	75
	<u>3333</u>	<u>2995</u>
Investaĵoj	3333	2995
Stoko de libroj korespondkursoj	339	133
Stoko de informiloj kaj paperaĵoj	128	171
Debitoro	—	5
Skribmaŝino	—	150
	<u>3800</u>	<u>R3454</u>

Subskribis C.S. Beckford,
Kasisto

SKALOJ

Herbondumoj milionpaŝe
fro tie ĉi al la Drakmontar'.
Ĉe orbitantoj longa mutoj;
ulno mezuras teron kun mar'—
de fingrofinoj ĝis kubuto—
la kontinentojn unu spano.
Levas okulojn steldirekten
plupalpema Liliputano.

19.11.1983

KVIETAJ HOROJ

Glimlune fajras punkturtenoj.
Kapo plena de sonĝoj, parfum'.
En herbodistojn eksterdome
formo forpaŝas al transa lum'.

18.11.1983

— Edwin de Kock



LIBROJ

Principe ni pritraktos nur la librojn sendotajn rekte al la redaktisto. Unu ekzempleron por mencio de la detaloj, du ekzemplerojn por recenzo.

VINTRA PENSO

Maten' odoras pike. Vintro platas. La mortaj kampoj kuŝas senespere sub grizaj nuboj. Vintron mi ne ŝatas. Eble mi plivigliĝos primavere,

kaj, kiel kampojn, nutros min la sterko? Hieraaŭ apud tombotru' mi staris kaj provis ion senti pri la ĉerko. Vane. Neniu emocio klaris.

Tio mirigis min, ĉar morto gravas, kaj devus vekti pensojn pri la vivo, ĉu la klopodoj pravas aŭ malpravas, aŭ ni nur blekas dum senkaŭza drivo.

Pri l' mortintino mi nenion sentis, kvankam mi penis min stimuli dece al sent' funebra. Ĉu mi do dementis por ĉiam homajn trajtojn, malhomece?

Sed kiam mi vin vidis postsepulte kaj banis min en via am' sekura, en mi l'anim' ondiĝis plorsingulte kaj morto ŝajnis temo plej terura.

— William Auld

KIAL NE KONGRESI EN BULONJO-APUD-MARO?

MALTRANKVILIGA estas la letero de la Sennacieca Asocio Tutmonda, aperigita aliloke en ĉi tiu revuo, precipe por ni Sud-Afrikanoj.

Se Pollando ne akceptos SAT, jam tiel bone establitan, kiel ni povos ricevi enirpermeson? Ni ankoraŭ bone memoras niajn akrajn problemojn akiri vizojn al Brazilo, por la tiam UK antaŭ kelkaj jaroj. Nur post baraktado kaj leteroj malagrablaj ni atingis tion, ke niaj membroj finfine sukcesis iri.

Estas pruveble vera, ke la Sud-Afrika Esperanto-Asocio laŭ sia Statuto klare difinas sian sintenon kaj agmanieron kiel kontraŭrasisman; sed oni naivus supozi, ke tio sufiĉus por certaj landoj. Ĉiam pli la unuopulo suferas la malamon de ŝtatoj kaj organizoj, simple surbaze de lia/ŝia civitaneco. Tion suferis eĉ homoj nigraj aŭ miksrasaj!

Tial ŝajnas prudente, ke ni jam nun klopodu ĉe UEA akiri *garantiojn* de la Pola ŝtato, ke en 1987 rajtos eniri tiun landon ĉiuj ajn esperantistoj kiuj deziras tion fari kongresocele. Nomotoj inter tiuj estu membroj de SAT, Sud-Afrikanoj, judoj, k.t.p.

Se tio ne eblus, UEA—aŭ, se necese, eĉ alternativa organizo—devus aranĝi alternativan Kongresegon aliloke. Tiucele ni proponas Bulonjon-Apud Maro, en la bela Francujo. Iam, en tempo por ni tre historia, tiu urbo montriĝis tre gastama. Sendube ĝi estus tia denove.

△△△

BONA ESPERO

Organo de la Sud-Afrika Esperanto-Asocio (SEA) kaj revuo ĝenerale kultura

Redaktisto: **Edwin de Kock**, Posbus 902-143, Bon Accord, 0009, RSA.

Kontribuaĵojn, prefere maŝinskribitajn, oni sendu la la Redaktisto. Oni sin turnu al li pri ĉiuj aferoj kiuj koncernas la revuon, krom abonoj. Pri tio ĉi bonvolu legi plu en posta paragrafo.

Respondecaj pri la opinioj publikigitaj la diversaj aŭtoroj kies nomoj aperas kun ili, la Asocio aŭ kluboj kiuj ensendis siajn raportojn kaj la redaktisto nur por propaj skribaĵoj.

Abonoj: La revuo iras senpage al membroj de SEA. Ĝin ricevas aliaj redaktistoj intersange por siaj revuoj. Nemembroj povas aboni, skribante al la Kasisto de SEA, kies adreso aperas sube.

SUD-AFRIKA ESPERANTO-ASOCIO (SEA)

Ĝenerala Adreso: La Sekretario, 75 Bronkhorst Street, Groenkloof, Pretoria, 0181, Respubliko de Sud-Afriko (RSA). Telefonoj (prefere hejme): (012) 46 8767 (hejme), (012) 298 3061 (labore).

ESTRARO

Prezidanto: Edwin de Kock, Posbus 902-143, Bon Accord, 0009, RSA. Tel. (012) 50621 (hejme), (01214) 2005/2006/2007, linio 2092 aŭ laŭdemande (labore).

Vicprezidanto: Axel von Blottnitz, Posbus 78544 J, Sandton, 2146, RSA. Tel. (011) 27 2363 (hejme), (011) 802 5290 (labore).

Sekretario: Oscar Sher, Adreso kaj Telefonnumeroj supre.

Kasisto: Colin S. Beckford, P.O. Box 1227, Cape Town, 8000. Tel. (021) 77 0588 (hejme), (021) 23 6133 (labore).

Aliaj Komitatanoj: Henri W. Appel (Alberton), Adèle K. Fouché (Port Elizabeth), Jan Hammes (Pretoria), Felix M. Woolf (Cape Town), Cobus Zeelie (Port Elizabeth).



NIA LANDA KONGRESO

Seaview Guest Farm, 4-6 Aprilo 1987

JEN la loko kaj la datoj por nia landa kongreso, dum kiu ni samtempe festos la 100-jaran Jubileon de Esperanto kaj la 25-an jaron de SEA.

Seaview Guest Farm situas 25 km ekster Port Elizabeto en pli-malpli okcidenta direkto, 3 km antaŭ la vilaĝo Seaview kaj 1,5 km de Kini Bay. Ĝi taŭgas ne nur por niaj celoj, sed ankaŭ el la vidpunkto de malstreĉaj ferioj apud la marbordo.

Por atingi Seaview Guest Farm el Port Elizabeto, oni veturas per vojo kiu diversstadie havas malsamajn nomojn. Temas komence pri Walmer Road, kiu fariĝas Buffelsfontein Road kaj poste Seaview Road.

Je nia dispono estos nur kvarlitaj ĉambroj en dometoj, sed kontraŭ prezo tre favora, nome R20,00 (dudek randoj) por ĉiu tago. Tio inkluzivas tri manĝojn.

Por tiu loĝado oni sin turnu al la posedantino, Sonja Keows, tel. (041) 74764.

Sed koncerne la Kongreson mem, oni faru kontakton kun Cobus Zeelie, ĉe Posbus 12271, Centrahil, 6006, Port Elizabeth, tel. (041) 731271 (hejme). La programo estas fine kunmetota en Port Elizabeto, sed ni petas, ke komitatoj kaj individuoj alsendu por tio siajn sugestojn aŭ ideojn al Cobus.

La datojn 4-6 Aprilo ni elektis, ĉar temas pri longa semajnfino, kun Lundo kiu estas publika ferio. Ankaŭ ekzistas neniu konflikto inter tio kaj la pli malfrua Pasko, ĉu Juda, ĉu Kristana.

Por iuj familioj krome eblos esti apud kaj en Port Elizabeto eĉ antaŭ kaj post la menciitaj datoj, kio eventuale kreas oportunaĵojn por aldonaj aranĝoj rilate al Esperanto.

NOVA VERKO DE WOOLF

English Phrases and Expressions in Esperanto (1969) de nia samlandano, Felix Woolf, montriĝis tiel populara, ke oni ĝin reprenis jam la trian fojon. Kaj jen aperis por ĝi nun aldono 41-paĝa, la *Supplement*, kun 3 000 kromaj artikoloj.

Ni konas la aŭtoron kiel personon skrupule zorgeman pri lingvaj aferoj. Li do tre klopodas redoni la nuancojn. Ĝenerale li ne impresas per esprimoj forte metaforaj, sed tradukoj lingve-logike-klaraj.

A *Supplement to the English Phrases and Expressions in Esperanto* rezultis el 17 jaroj da laborado. Ĝi meritas lokon apud la verko, kiun ĝi "kompletigas" (kvankam, kompreneble, tia tasko neniam povas havi veran finon).

Unu aferon mi bedaŭras, nome la preson. La broŝuro (21 x 14,5 cm) estas fotostataĵo kun skribo legebla sed ne tre bona. Espereble oni iam represos la verkon pli inde. La prezo tamen estas modesta laŭ la nuna valoro de nia monunuo, nome nur R3,50).

Oni mendu la *Supplement* rekte de la aŭtoro: S-ro F.M. Woolf, Poŝtkesto 17047, Sea Point, 8061, Kaburbo.

RIA LAMBA KINERJES

Survei Geologi No. 11, April 1957

Survei Geologi No. 11, April 1957, p. 1-10. (This page is blank.)

Survei Geologi No. 11, April 1957, p. 1-10. (This page is blank.)

Survei Geologi No. 11, April 1957, p. 1-10. (This page is blank.)

Survei Geologi No. 11, April 1957, p. 1-10. (This page is blank.)

Survei Geologi No. 11, April 1957, p. 1-10. (This page is blank.)

Survei Geologi No. 11, April 1957, p. 1-10. (This page is blank.)

Survei Geologi No. 11, April 1957, p. 1-10. (This page is blank.)

RIA LAMBA KINERJES

Survei Geologi No. 11, April 1957

Survei Geologi No. 11, April 1957, p. 1-10. (This page is blank.)

Survei Geologi No. 11, April 1957, p. 1-10. (This page is blank.)

Survei Geologi No. 11, April 1957, p. 1-10. (This page is blank.)

Survei Geologi No. 11, April 1957, p. 1-10. (This page is blank.)